

Numero: 242.
Julio: 2012.

20-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Amo

El nia mondo mankas la amo. Ni ĝenas unu la alian per ago kaj vorto.

Malaperis el nia koro la kompreno kaj indiferece ni rigardas la suferon de niaj homfratoj.

-Kial mi konsentu? Ja tio ne estas la mia. Se hazarde nin trafas la malbono, ni insultigante riproĉas homaron, ĉar neniu deziras helpi al ni.

Ĉu ni helpis al iu?

Ne, – tiam kial ni atendas konsenton de alia homo.

La nuna mondo tute ŝanĝiĝis. Nenie estas trovebla amo, nur perforto.

Dum la tuta tago la televido elsendas nur perfortajn, sangavidajn filmojn. Jam infanaĝe ni al kutimiĝis al la perforto kaj morto. Se homo mortas sur ekrano neniu surpriziĝas, eĉ ni trompiĝas, se ni ne ricevas la ĉiutagan murdon en la televido.

Ĉiu filmo temas pri murdo de alia homo. Kie estas la amo?

Nun certe kelkaj legantoj ekkrias: „Ja en ĉiu filmo estas plena de sekso kaj pornografio, sed mankas la vera, sincera amo.

Ni forgesis ami. La amo jam por ni estas malproksima, neatingebla celo de nia vivo.

Ĉiu deziras trovi la amon, sed ĝi kaŝiĝas de antaŭ ni kaj restas nur ĉarma revo.

Amo, amo revenu kaj ĝojigu la homaron, por ke nia mondo estu pli bela.

Ni ne forĵetu la esperon! La amo trovos tiun, kiu kredas je tio.

Estu nia mondo plena de amo, kaj tiam ĉio plibeligiĝos ĉirkaŭ ni.

Ni ellernu estimi nian homfraton kaj ni estu fieraj kial la amo frapetas sur nia pordo.

-Redaktanto-

Vortoj

Duope ili sidis sur la benko. Ili komence longe silentis. Preter ili homoj rapidis. El ili kelkaj ĵetis rigardon al ili.

Unue la viro ekparolis. Lia voĉo estis necerta. Ĝi sonis timeme, ĉar li ne konis la junulinon.

La knabino surpriziĝante eklevis sian kapon kaj mire ŝi rigardis al li. Ŝiaj okuloj kvazaŭ estus dirintaj:

--Kion vi deziras, sinjoro?

La homaj okuloj povas paroli, ofte ili estas pli parolemaj ol la buŝo.

Ridetaj aŭ amaraj okuloj rakontas pli multe dum unu momento ol mil vortoj.

La belaj, bluaj okuloj ridetis dolĉe al li. Subite li ne sciis, kiel daŭrigi. La vortoj haltis en lia gorĝo. Li apenaŭ povis ekparoli.

Malrapide komenciĝis la parolado. La vortoj unue fluis, kiel rivereto en verda kamparo, kie en la foro mil kaj mil floroj pompis.

La knabino silentis. La vortoj karesis ŝin kaj ŝi per siaj belaj bluaj okuloj kuraĝigis lin. Ĉiu voĉo estis muziko por ŝiaj oreloj.

Fine la viro forgesiĝante pri timo, kiel printempe la glacio ekdegelis, kaj facilanime ĉirkaŭbrakumis ŝin per zumaj, mildaj vortoj. Tio ĉarmis ŝin kaj tute ŝi transdonis sin al la sinceraj sentoj, kiuj loĝis en ŝia animo.

Kia estus la homo sen vortoj? Nur senviva objekto, kio ŝvebas en la vasta universo, kiel miliardoj da steloj kaj ĝi kunfandiĝos kun nenio.

Ankaŭ vortoj forflugas. Post kelkaj sekundoj jam neniu memoras pri ili – aŭ tamen? Mi ne scias. Mi nur suspektas la forton de la vorto.

Atentu, se vi malfermos vian buŝon, el ĝi la vortoj elflugos kaj oni ne scias, kie ili haltas.

-Ŝaŝa-



En la mondo iras forta vento, per
de facila vento nun de la
al loko. Ne al glavo sangon
ĝi la homan tras familion: al
eterne militanta ĝi promesas sian
harmonion. Sub la sankta signo
de la esperantoj, forte staras muroj
de miljaroj inter la popoloj dividita,
sed disaltas la obstinaj baroj per la
sankta amo diskutita. Sur neŭtrala
lingvo fundamento komprenante unu
la alian, la popoloj faras en konsento
unu grandan rondon familian.
En la mondo iras forta vento, per
de facila vento nun de loko. Ne al glavo
sankta ĝi la homan tras familion: al mond' eterne
militanta ĝi promesas sian harmonion. Sub la sankta signo de
de miljaroj inter la popoloj dividita, kaj rapide kreskas la afano
de la esperantoj. Forte staras muroj de miljaroj inter
dividita, sed disaltas la obstinaj baroj per la sankta
Sur neŭtrala lingvo fundamento komprenante unu
popoloj faras en konsento unu grandan rondon familian.
Malpaco en laboro paco ne laciĝas, ĝi la
de loko. Ne al glavo sangon, ĝi la homan tras familion, al mond' eterne militanta ĝi promesas sian harmonion. Sub la sankta signo de la esperantoj, forte staras muroj de miljaroj inter la popoloj dividita, sed disaltas la obstinaj baroj per la sankta amo diskutita. Sur neŭtrala lingvo fundamento komprenante unu la alian, la popoloj faras en konsento unu grandan rondon familian.

Diablo

Li loĝis en vilaĝfina dometo. La homoj timis de li. Onidire li renkontiĝas ĉiunokte kun la ĉefdiablo kaj ili kune amuziĝas dancante kaj drinkante kaprolakton.

Kio estas la vero? Tion la vilaĝanoj ne sciis. Li estis malriĉa homo vivanta sola. Li ne havis parencojn kaj geamikojn. Ĉiu evitis lin, kaj ili nomis lin Diablo.

Tiu ĉi vorto arde traboris lian menson, kaj li ne povis liberiĝi de ĝi.

Ĉiuhore kaj ĉiuhore li pensis pri ĝi. La homoj fingre montradis al li.

--Tie iras la diablo. -- Infanoj sekvis lin ĉien, kaj senĉese kriadis -- Diablo, diablo.

Komence li returnis sin, kaj ekprovis forpeli la bubaĉojn, sed sensukcese. Ofte lin ili ĵetadis per ŝtoneroj.

Maljunulino vane volis konvinki la infaronon, neniu knabo ektimis.

--Lasu lin! -- ŝi petegis -- En li loĝas la diablo kaj li sorĉos vin.

La infanoj ne atentis je ŝi. Ili plu pelis la diablon kaj dume ili laŭte ridaĉis.

Lia korpo estis kompatinda. Eble jam denaske li estis kripla. Sur lia dorso estis granda ĝibo. Krome li ankaŭ lamis. Se li nervoziĝis, tiam sur lia vango ekaperis grimacoj kaj lia tuta kapo deformiĝis.

Surstrate ofte eblis vidi lin tiel, ĉar la vilaĝanoj vere timis de li, sed tamen preskaŭ ĉiu primokis la malfeliĉulon. Tial li prefere iris surstraten malofte kaj li evitis la homojn.

Okazis en iu varma somera tago, ke en la vilaĝo domo bruliĝis. La flamoj inundis la tutan domon dum kelkaj momentoj. Neniu sciis, kiel okazis la incendio.

La najbaroj kaj la alrapidantaj homoj senkonsile staris ĉe la domo. Vane ili provadis bremsi la fajron, la flamoj estis tiom grandaj, ke neniu povis estingi ĝin.

Sur la strato virino histerie ploris, eĉ ploregis. Ŝi serĉis sian filineton. Laŭ ŝi la knabino estas ene. Verdire ŝia ploro aŭ vekrio ne estis aŭdebla. La najbaroj trankviligis ŝin, ke certe la etulino elkuris ankoraŭ antaŭ la incendio.

Kompreneble neniu vidis ŝin ekstere. Kelkaj opiniis, ke ŝi forkuris pro la timo kaj baldaŭ revenos.

Sed tion neniu kredis sincere, ĉar oni sciis bone, la knabino estas ene inter la flamoj.

Dume la fajro fariĝis pli granda. Jam ankaŭ la lignobarilo ekfajris, kaj la traboj de la tegmento komencis krakadi.

Ankoraŭ kelke da minutoj kaj la domo ruiniĝos.

Tiam alvenis tien Diablo. La homoj ekhurlis kaj diradis:

--Li faris la incendion. Li estas la krimulo. Morton al li! Morton! Morton!

Fine jam ĉiu kriadis.

Li staris konfuziĝante kontraŭ la homamaso. Jam li ne povis forkuri.

Li venis al la domo por helpi. Li pensis, ke la vilaĝanoj estos tiom malamikemaj.

Diablo estas forta, muskola viro. Oni rakontis, antaŭ jaroj li eklevis grandan ĉevalĉaron. Alifoje oni rakontis, kiel junulo, tiam loĝante inter la montoj, li murdis propramane urson.

Restis nur unu vojo por rifuĝi: la brulanta domo. Li iom hezitis kaj li enkuregis inter la flamojn.

La ĉeestantoj eksiblis, kaj sekvis longa, muta silento. Krom la bruo de la fajro nenio estis aŭdebla.

Ĉiu atendis nervoze nesciante, kio okazos ene.

Fumo kaj flamo estis ĉie. La aero ardis pro la varmeĝo.

Eble pasis tri aŭ kvin minutoj, kiam neatendite en la iama pordo de la domo ekaperis Diablo kaj en siaj brakoj li portis svenantan knabineton. Li kuregis al la unua homo starante plej proksime kaj li transdonis la etulinon. Li forte kaj serioze enrigadis la okulojn de la miranta homo kaj senvorte rekuris en la domon.

Oni ne sciis kial li reiris? Kion li volis ankoraŭ en la danĝera domo, kiu jam ĉie brulis, kaj li apenaŭ malaperis en la fumo, kun granda bruego la domo ruiĝante falis surteren.

Ĉio pereigis. El la domo restis nur cindro kaj kelke da fulgiĝintaj traboj.

Oni vane serĉis Diablon inter la ruinaĵoj postrestaĵoj. Li ne estis trovita. Por ĉiam li malaperis.

Ĉu eble tamen li estis diablo kaj per la helpo de incendio li reiris al la Infero?

Nun jam tion neniu ekscios. Malgraŭ tio, ke la homoj pensis, ke en ilia vilaĝo loĝis mem la diablo. Vere ili ne komprenis kial li savis la knabineton. Ili timis koncedi, en la kripla korpo loĝis anĝelo.

-Apáti Kovács Béla-



Poezio

Anna

I

Anna, diskrra kaj enua,
per distra mano suprentiras
la ŝtrumpon, kaj pro l' hor' vakua
ion nebulan prisopiras,

kaj mi, sidante en proksimo,
ekvidas gambon filigranan
kaj, ekpulsante pro l' intimo,
lascive eksopiras Annan,

kaj premus kun avid' purpura
vizaĝon inter ŝiaj mamoj,
kusenaj mamoj de matura
graseta spertulin' pri amoj.

Kaj certe se mi entreprenus,
eĉ malgraŭ apatia stato
al sia sino ŝi min premus
pro simpatio kaj kompato,

kaj lulus mian kapon milde
sur sia varmodora nudo,
kaj vartus dum momentoj ŝilde
min de l' turmenta vivokrudo.

Sed post miraklo de orgasmo –
mi bone scias – venus re la
eĉ pli profunda kormarismo.
Ne solvas splenon fulmo de la

kares' pasie senpasia:
mi strebas do al ekvilibro.
Anna, subite rekonscia,
babilas jam pri nova libro.



Poezio

II.

Anna, en ŝtrumpoj kaj kalson'
aspektas vere monumenta:
ŝveba ĝarden de Babilon'
ne estis tiom eminenta

kiom la mamoj, je muaro
skuitaj per plej milda mov'
kiel tremola foliaro
pro delikata ventoblov',

kaj la Melosa Afrodite,
de l' tuta mond' admirocentro,
ĵaluzus plej senintermite
pri l' ronda ĉarm' de ŝia ventro.

Sed Anna, antaŭ la spegul'
sin vidas preskaŭ kun malŝato
kaj zorge notas sen gratul'
la plivastiĝon de l' formato,

kaj sentas, ke forflugas viv'
kaj maljunaĝo venas froste;
sennombraj noktoj de lasciv'
kaj ĝu' volupta lasis poste

impreson malprecizan de
sencelo, vano kaj malriĉo;
ankoraŭ io mankas tre,
ŝin iel fintis plenumiĝo.

La lastajn vestojn ŝi demetas
(ebura gamb', ingvena ambro)
kaj post momento tualetas,
kantante gaje, en banĉambro.

-William Auld-



Por infanoj

Eta porko kaj la lupo
(hungara popolfabelo)

Iam estis eta porko, kiu havis dometon en la mezo de grandega arbaro.

En iu tago, kiam ĝi kuiris la tagmanĝon en la dometo, iras tien la timiga lupo, kaj diris antaŭ la pordo:

--Lasu eniri min kara eta porko, ekstere estas tre malvarme. Mi malvarmas.

--Mi ne lasas vin eniri, ĉar vi manĝos min.

--Almenaŭ lasu eniĝi iun malantaŭan piedon!

La eta porko lasis eniĝi ĝian iun malantaŭan piedon, sed dume ĝi iris al la forno por varmigi poton da akvo. Post iom da tempo la lupo denove ekparolis:

--Kara eta porko, mi petas vin, lasu eniĝi ankaŭ mian alian malantaŭan piedon!

La eta porko obeis, kaj lasis eniĝi ankaŭ tion. Sed la lupon tio ne kontentigis. Post kelkaj minutoj ĝi diris:

--Kara eta porko lasu eniĝi ankaŭ miajn du antaŭajn piedojn!

La eta porko lasis eniĝi ankaŭ ĝiajn du antaŭajn piedojn, sed la lupon ankaŭ tio ne kontentigis, ĝi denove ekparolis:

--Mia dolĉa, kara eta porko, lasu eniĝi min tute! Mi garantias, ke mi ne manĝos vin, eĉ mi fariĝos via sincera amiko.

La eta porko serĉis grandan sakon, kaj tion metis al la pordo, por ke la lupo eniĝu ĝin. Ĝi malfermis la pordon.

La timiga bestego rekte ensakiĝis. La eta porko ne hezitis. Ĝi tuj ligis la sakon kaj deprenis de sur la forno la bolantan akvon, kaj per ĝi la lupo estis verŝita. Poste ĝi tuj suprengrimpis altan arbon.

La lupo longe sufregis en la sako kaj veadis amare. Fine iel ĝi sukcesis malfermi la sakon, kaj liberiĝis. Ĝi forkuregis por venigi siajn lupkamaradojn. Baldaŭe ili amase alvenis al la dometo, kaj komencis serĉadi la etan porkon. Nenie ili trovis ĝin, ĝis iu rigardis supren al la arbo. Ili iris tien, kaj komencis cerbumi, kiel atingi la etan porkon. El ili neniu povis suprengrimp.

Post longa pensado ili decidis, ke ili staros la dorson de unu la alia kaj eble tiel la plej supra atingos la etan porkon.

Ili komencis ekstari sur la dorson de unu la alia. La brogita, kalva lupo estis malsupre, ĉar ĝi timis iri supren. Tiel ĉiuj lupoj staris sur ĝia dorso.

Jam ili estis tiom alte, ke ankoraŭ unu lupo estis bezonata atingi la etan porkon. Ankaŭ la lasta lupo komencis grimpi, kiam neatendite la eta porko ekkriis:

--Varmegan akvon sur la kalvan lupon!

La kalva lupo ege ektimis, kaj ĝi saltis de sub la aliaj. La multaj lupoj ĉiuj falegis surteren, kies piedo, kies kapo rompiĝis. La kalva lupo forkuris, kvazaŭ ĝi neniam estintus tie.

La eta porko malsuprengrimpis de sur la arbo, kaj eniris sian dometon. Plurfoje la lupoj neniam kuraĝis viziti ĝian hejmon.

-Tradukis: Apáti Kovács Béla-



Infano

Mi jam ne estas infano
laŭ la signifo en vortaro.
Nun mi jam estas viro
kun aferoj en la mano.

Sed vere mi estas infano
antaŭ la viva mistero
tiel granda kiel marego,
neatingebla kiel la horizonto.

Kiam mi rigardas al infano
mi sopiras je infana vivo
sen aferoj en la mano.
Sed mi jam estas viro.

Noemuti-Timoro, januaro 2010



Someraj bildoj

Someraj bildoj

